1999 5

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



Snejana Kononova

[NIĴNJAA OMKA, Omskaja obl., Rusio]

redakcie — virtuale tra la mondo — gramatiko kaj trafiko aventuroj de brava espo — "verkado estas la plej bona trejnado" — anekdotoj — ilustrita vortaro pri heraldiko korespondu!

# KOMENCANTO

1999 numero 5/ refondita en 1997/ 8 numeroj jare
redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:
620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
elektronika poŝto : let@post.e-burg.su
abontarifo por 1999:
*internacia tarifo*:
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12; *orienteŭropa kaj latinamerika tarifo*: $10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK
konto ĉe UEA: vkud-a
*ruslanda tarifo kaj la rubla zono* : 54 рубля (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132


# PERANTOJ
## de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W. 2036.
ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice
ESTONIO
Virve Emits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn
FRANCIO
Raoul G.Melo, 34, av de Russie, F-03700, Bellerive s/Allier
IRANO
Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN
ITALIO, KROATIO, SLOVENIO
Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste
KUBO
Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460
Playa 11300, HAVANO
POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa
SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby
SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen
UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

ĈINIO - vakas; BRAZILO - vakas; BRITIO - vakas; JAPANIO - vakas; NEDERLANDO kaj ceteraj - vakas;

# redakcie

Karaj legantoj!

Dank'al Dio ni preterpasis la duonon de la 1999-serio. Tiu ĉi kajeron ornamas brila desegnaĵo de *Snejana Kononova*, kiu nomiĝas "Somero". Post la tre bela "Printempo" de la kovrilpaĝo de la 3-a numero la redakcio mendis ĉe *Snejana* la "sezonan" serion kaj evidente vi ĝuos "Aŭtunon" kaj "Vintron".

En nia "ĉefa temo" ni decidis fari iom neatenditan turnon kaj rakonti pri la "virtualaj vojaĝoj tra la mondo", pri vojaĝoj sen fizika ĉeesto. Ni represas artikolon el JARLIBRO-1999 de UEA, kiu eble plej detale informas pri la temo "Esperanto kaj komputiloj" kaj donas multajn utilajn ret-adresojn.

Sur la gramatika kampo ni decidis prilumi la temon, kiu fakte koincidas kun nia "ĉefa temo" *Esperanto kaj vojaĝoj* — GRAMATIKO kaj TRAFIKO. Ni startas de la individuaj trafik-rimedoj kaj planas rakonti pri la komunaj veturiloj, pri la aeraj flugaparatoj kaj la akvaj naĝ-rimedoj.

Sur la kvina paĝo vin atendas la fino de la rakonto "Aventuroj de brava espo" de *Gafur Gazizi*.

La sesa paĝo distras nin per malsimilaj, sed tre lertaj ekzercoj en niaj konkursoj pri la verkado de rakonto je unu sama litero de *Alla Utkina*, lirika "blanka" poemo pri la lago SELIGERO de *Vladimir Juĉajk* kiel respondo al la RIMARO de *Bill Thorne* kaj iom neatendita rakonto "Milito kiel milito" de tute nova esperantisto, kiu ankoraŭ ne finis la elementan kurson *Jurij Perevalov*. En la rakonto ĉiu sekvanta vorto komenciĝas je la vica litero de la esperanta alfabeto.

Bedaŭrinde, neniu divenas niajn enigmojn, almenaŭ ni ne ricevas reehojn. Eble ni fermu tiun rubrikon? Respondu!

Sufiĉe multaj tradukistoj de anekdotoj ĉi-foje.

Tra la tuta kajero ornamas la tekstojn taŭgaj kaj spritaj desegnaĵoj de *S.Kononova, N.Vinnikova, Ju.Perevalov, W. Thorne*.

Sur la dorsa paĝo atentu informon pri ILUSTRITA VORTARO pri HERALDIKO de konata ukraina esperantisto *Nikolao Starodubcev* kaj kutimajn adresojn por korespondi.

Ni petas pardonon ĉe s-ro *I.Onet*, kies nomo estis indikita en "K" kiel peranto por Usono sen plia konfirmo. Tial provizore usonaj esperantistoj ne havas peranton por nia revuo.

Sed s-ro *M.Reza Torabi* el TEHRANO en la nomo de IRANA ESPERANTO-CENTRO plene konfirmis sian emon disvastigi KOMENCANTON por Irano, tial ni plezure metas iranan adreson en la liston de niaj perantoj.

**redakto-fino de "K"-6'99 la 1-a de septembro**

*Derk Ederveen*
el JARLIBRO-1999 de UEA

ESPERANTO en INTERRETO

# VIRTUALE TRA LA MONDO

## Komputiloj pli kaj pli penetras en la ĉiutagan vivon

Ili ofte estas ligitaj per retoj, kio ebligas rapidan kaj facilan komunikadon kaj interŝanĝadon de informoj.

De la momento de la ekestoj de tiaj retoj, ankaŭ esperantistoj aktivas en ili. Se vi laboras per komputilo en la universitato aŭ granda firmao, povas esti, ke vi jam povas uzi komputilajn retojn, plej ofte la t.n. WWW/TTT (World Wide Web / Tut-Tera Teksaĵo), Internet aŭ Bitnet. Se vi hejme havas komputilon kaj modemon, vi povas tra loka bultenejo (BBS — *Bulletin Board System*) kontraŭ malaltaj kostoj konektiĝi al servo, kiu ebligas al vi uzadon de la reto (ekz-e CompuServe aŭ Internet). Preskaŭ ĉiuj retoj estas interligitaj, do se vi havas konekton al iu reto, vi plejofte ankaŭ povas atingi personojn (aŭ informojn) en aliaj retoj.

La ebleco de via retkonekto konsiderinde varias kun la servo, la tipo de la reto al kiu vi konektiĝas, kaj la tipo de konekto, kiun vi uzas. Plej gravas la tipo de la konekto: rekta aŭ ne rekta. Se vi havas rektan konekton, la komputilo per kiu vi laboras, havas daŭran ligon al la reto. Ekzemploj estas komputiloj en Internet aŭ Bitnet, ofte de firmaoj aŭ universitatoj. Se vi havas nerektan konekton, la komputilo per kiu vi laboras regule kontaktas alian komputilon. Ekzemplo estas via propra hejma komputilo, kiu per modemo kontaktas bultenejon en Fidonet, aŭ servon, kiu prizorgas Internet-konekton por vi.

Eblecoj.

Ĉi-sube mi listigas kelkajn ekzemplojn de eblecoj, kiujn vi povus havi per retkonekto.

Mesaĝoj kaj Korespondа servo:


Samkiel paperpoŝtan leteron, eblas sendi elektronikan leteron al aliaj retanoj. La mesaĝo alvenas ene de kelkaj tagoj (nerekte), aŭ foje eĉ ene de kelkaj sekundoj (rekte).

Diskutforumoj:

Diskutforumoj similas al ĉiutage aperantaj gazetoj. Ili ebligas rapidan interŝanĝon de informoj kaj ideoj. Ekzistas Esperanto-diskutforumoj ekz-e en CompuServe (FLEFO), en Internet/Usenet esperanto-l@netkom.com kaj soc.culture.esperanto kaj en Fidonet (ESPERANTO).

Babilforumoj:

La komputila versio de la telefonaj babilnumeroj. Se vi retumas per rekta konekto, eblas "babili" kun unu aŭ pluraj personoj: ĉion, kion vi tajpas, tuj vidas la aliaj personoj. Tio ekzemple eblas en Internet kaj Bitnet. En internet ekzistas "renkontiĝoj" per IRC en la Esperanto-kanalo. Vidu http://www.esperanto.net/veb/irc-esp-eo.html. ICQ lastatempe fariĝis populara alternativo por IRC. Vidu http://w3.to/icqlisto.




**Jurij Perevalov**,
[LESNOJ, Sverdlovskaja. obl., Rusio]

Arkivoj:

La bibliotekoj de la komputilaj retoj. Centraj arkivejoj ofertas programojn, informojn, tekstojn ktp. Esperanto-arkivoj ekzistas almenaŭ en *CompuServe*, kaj en *Internet* ftp://ftp.stack.nl/pub/esperanto. En *Fidonet*, bultenejo Saluton! en Nederlando (2:283/323; +31 53 4326886) havas multajn Esperanto-materialojn.

Tut-Tera Teksaĵo (TTT) World Wide Web (WWW):

Dum la lastaj kvin jaroj tiu ĉi aldona speco de uzado de *Internet* ekfuroris. Eĉ tiom, ke multaj opinias, ke TTT kaj *Internet* estas la sama afero, dum *TTT* fakte estas nur (tre sukcesa) parto de la eblecoj de *Internet*. Ĝi funkcias per "aktivaj dokumentoj" en formato HTML, kiuj enhavas ne nur tekston sed ankaŭ bildojn, sonon, kaj ligojn al aliaj aktivaj dokumentoj en aliaj komputiloj tutmonde. Pro tiuj ligoj, ili ebligas rapidegan elfosadon de informoj, sed samtempe ankaŭ senfinan ĉirkaŭvagadon en senlimaj sensencaĵoj kaj reklamaĵoj. Multaj esperantistoj jam havas propran aktivan dokumenton ("hejmpaĝon"), kaj multaj Esperanto-organizoj informas per tiaj paĝoj pri siaj aktivecoj. Bonegaj komenclokoj estas http://www.sc.chalmers.se/~martinw/esperanto kaj http://esperanto.net/, kie vi trovos ligojn al *Esperanto.Net*, la *Virtuala Esperanto-Biblioteko*, Virtuala Esperantujo kaj pluraj listigoj de retadresoj kaj renkontiĝejoj.

Esperanto:

Ankaŭ ekzistas kelkaj Esperanto-Servoj. Detalaj informoj pri ili troveblas en la "Flavaj Paĝoj", kiuj estas regule aktualigataj, kaj kiuj haveblas en la plej gravaj arkivejoj. Aktuala versio ĉiam haveblas je http://www.esperanto.net/veb/flavaj-pagxoj.html. Jen kelkaj ekzemploj.

Adresaro:

Mi administras la Adresaron de Esperantistoj kun retadreso kiu nun enhavas adresojn de pli ol 1750 personoj el 74 landoj. Precipe valora estas la fakto, ke enestas multaj personoj ekster Usono kaj Eŭropo, same facile kaj rapide atingeblaj. Tuj kiam vi ekhavos vian retadreson, sendu mesaĝon al mi, por ke mi aldonu vin. La *Adresaro* haveblas en la plej gravaj arkivejoj kaj estas monate aktualigata. Per TTT vi povas aliĝi je adreso http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/aligxo/. Se vi ŝatus havi pli da informoj, kontaktu, ekzemple, *Derk Ederveen*, komisiono pri Internet ĉe UEA lide@wxs.nl, aŭ aliajn Retajn Delegitojn, kies adresoj estas en la *Adresaro*.

Kursoj:


Ekzistas Enkondukaj Esperanto-kursoj, nun en la angla, franca kaj germana. Ankaŭ daŭriga kurso, en Esperanto kun nacilingvaj vortlistoj, funkcias surbaze de la kurso *Gerda malaperis!* de Claude Piron. Vidu http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/lerni/html.

# GRAMATIKO kaj TRAFIKO


*Esperanto kaj Vojaĝoj* estas la ĉefa temo de "K" por 1999. Tute nature estas respeguli la temon sur nia gramatika paĝo. Per kio oni faras la vojaĝojn? Per veturiloj. La veturiloj ekzistas surteraj, akvaj kaj aeraj. Ni prezentos kelkajn pli ofte uzatajn veturilojn individuajn kaj komunajn, kaj klarigos kelkajn ĉe-veturilajn nociojn.

Fakte forestas en la temo gramatikaj malfacilaĵoj aŭ komplikaĵoj, tial nia gramatika paĝo pli similos al BILD-VORTARO.

## ĉevalo kaj kaleŝo




## biciklo





Inspektoro haltigas aŭton kiun stiras juna francino
Ŝi demandas kokete:
— Ĉu mi tro rapide veturis?
— Ne, sinjorino, vi tre malrapide flugis!

## motorciklo




## aŭtomobilo = aŭto




Aŭto-stiranto al petveturantino:
— Eniru. Mi ne estas tia, kia tiuj aĉuloj, kiuj prenas nur belajn virinojn!

*Ni publikigas la finon de la rakonto pri la vera viva okazintaĵo de*

**Gafur Gazizi**
[SALAVAT, Baŝkirio, Rusio]

# KIEL VOJAĜI PER ESPERANTO. AVENTUROJ DE BRAVA ESPO


**(fino. komencon legu en la numero 4'99)**

...kaj jen, tri preparaj semajnoj, dum kiuj mi diligente parkeris la hispanajn frazojn, pasas en diversaj paperaj zorgoj. Kaj fine mi, la unika Espo, estas vokita en la urban administrantaron pri turismo kaj sporto. En la municipa ĉambro mi ekstaras kvazaŭ "nuda inter lupoj" antaŭ kvin severaj ekzamenantoj. Feliĉe ĉe la aparta tablo sidas ankaŭ mia amiko - eksa kursano. Komenciĝas. La ekzamena ĉefo (ŝajne iu vicurbestro pri la ŝtata sekureco) verŝas sur min amason da demandoj, kiuj sole pretendis esplori mian pretecon labori por la patrolando. Mi, jam forĝita politike (nu, kiun esperantiston ne tuŝas la politiko?), kuraĝe respondas al ĉiuj. Fin-fine sekvas la lasta demando: "Ĉu vi scias paroli la hispanan?" Mi jesas. Tiam la ĉefa "ekzekutisto" skribas ion sur folio kaj etendas ĝin al mia amiko kun la vortoj: "Bonvolu diri hispane al la "kamarado", kion mi skribis, por ke li traduku tion ruse!"

Mia amiko, (certe por la administrantaro nia konateco estis kaŝata), prenas la folion, mense elrusigas kaj voĉas al mi en iom difektita Esperanto. Mi tuj sen ajna cerbo-streĉo rerusigas la diraĵon. La ĉefo miras kaj postulas, ke mi rakontu hispane pri mia lando Baŝkirujo. Mi facile plenumas tiun taskon kaj eĉ enŝovas kelkajn hispanajn esprimojn el la jam enkapigita frazlibro por tiel danki mian amikon pro la subteno. Kaj li ĉion lerte eĉ pli bele rediras ruslingve al la ĉefaĉefo, kiu fine kun profunda favoro kiel bona patro okulkaresas mian brilan kaj talentan kapeton... Jen, tiel, oni aprobis min, esperantiston, kiel la duan ĉiĉeronon por la vojaĝo al la sorĉa lando Hispanujo.

Kaj mi povas rakonti al vi ankaŭ pri la aliaj aventuroj en Hispanio, ekzemple, pri tio, kiel mi estis "sub kloŝo" de la sekreta polico aŭ kiel unu "muĉaĉo" (hispane: knabo) implikis min en bordelon, sed tio estos alifoje. Ĝis la-la!

**(Daŭrigo eble sekvos)**



**Bill Thorne,**
[LONDONO, Britio]

Do, karaj legantoj, vi atestis kiel utilas Esperanto. Necesas nur bondeziri, ke al niaj E-kursoj pli ofte venu tiaj "amikoj" — solaj fakuloj pri ekzotikaj lingvoj, tiam ni, espereble, ĉien povos facile fri-vojaĝi, ĉu ne?

via kunvojaĝanto ***Gafur Gazizi***

*La redakcio atendas rakontojn pri vojaĝoj, kiuj (eble) okazis al vi lige de la internacia lingvo Esperanto. Ni plezure publikigos viajn aventurojn!*

**JUĈAJK Vladimir Rejhartoviĉ**
[OSTAŜKOV, Tverskaja obl., Rusio]

# SELIGERO



Nina Vinnikova

Bone estas ripozi en *Seligero*
Precipe kiam venas somero
Tage varmiĝas la tero
Maturiĝas bero,
Sed jen el la tero
Malleviĝas vespero,malvarmiĝas aero
Mallaŭte falas pina tubero
Flugas el lignofajro al la ĉielo fajreroj
Mallumiĝas kaj nin ĉirkaŭas mistero
Rapide naskiĝas en la kapo vespero
Kaj oni ligas literojn sur la papero
Per la mondo regas espero

**Alla Utkina,**
[LESNOJ, Sverdlovskaja ob., Rusio]

# KRIMA KUTIMO

Krokodilo kaj krokodilino koleras, ke kuniklo kaj kato kolportas.

Konkurantoj kolportis kaj kverelis. Kuniklo kaj kato krias: "Kolbaso! Kolbaseto! Karoto!"

Krokodilo kaj krokodilino konkrete kaj koncize konvinkas: "Kakao!" Kontenta kuniklo kaj kato komune kantas kanzonojn.

Konkurantaj krokodiloj klaĉas: "Kovarda kato! Kovarda kuniklo! Katastrofo!"

Konkurantoj kverelas, kuraĝe kolizias kaj konfuzas klientojn. Klientoj krias: "Krimo!"

Konkurantoj konfuziĝas kaj kreas konkordan kontrakton. Klientoj kontentas.

**Jurij Perevalov,** [LESNOJ, Sverdlovskaja obl., Rusio]


# Milito kiel milito

J.Perevalov por nia konkurso verkis tre originalan rakonton, kies vortoj komenciĝas je la literoj de Esperanta alfabeto. Bravulo!

Armeoj batalas. Cindro ĉie. Damaĝiĝas ekologio. Frenezaj gvidantoj ĝojas. "Hundoj!" — ĥore indignas junaj ĵurnalistoj. Kameraoj liveras monstrojn novajn. Orfoj ploras. Riveroj Sangaj Ŝaŭmiĝas. Tombe urbaj ŭ-radiaktivaj Ventoj Zumas.



**Snejana Kononova,**
[NIĴNJAA OMKA, Omskaja obl., Rusio]




**Olga Isajeva**,
[ ASBEST, Sverdlovskaja obl., Rusio]

Rampas formiko kaj elefanto trans ŝtata limo
— Rampu plu sola, - diras formiko al la elefanto, - la limgardistoj min rimarkis

***

Patro al la filo:
— Dume vi estis en lernejo via papago forflugis.
— Mi tion atendis, - hieraŭ ĝi tro atente rigardis la mapon de Afriko

**Helena Jakovleva**,
[ARĤANGELSK, Rusio]

Anonco sur la pordo:
"Atenton! En la korto estas tre malica hundo"
sube la najbara huligano alskribis:
"Sed sen dentoj".
tiam la mastro aldonis:
"Sed elsuĉos ĝis morto!"

**Natali Jefimova**, [USTJ-KATAV, Ĉelabinskaja obl., Rusio]
Ĉe la bordo de rivero promenas viro kun fotilo. Al li proksimiĝas krianta virino:
— Rapidu, rapidu! Mia amikino dronas!
— Ho, ve, sinjorino, la bendo jam finiĝis!

**Denis Aŝmarin**, [KURGAN, Rusio]
demando en kvizo:
— Kiu estas la plej forta ŝakisto en la mondo?
— Majk Tajson!

**Viktor Alikin**, [PERMO, Rusio]

ж ж ж

Parolas du fiŝistoj
— Kion vi faris dimanĉe?
— Mi veturis kaptadi karasojn.
— Ĉu multajn karasojn kaptis?
— Eĉ ne unu.
— Tiam de kie vi scias, ke kaptadis *karasojn*?

ж ж ж

En la klubo de fiŝkaptistoj oni akceptas la novan anon.
Unu el veteranoj diras:
— Mi timas, ke vi kun viaj fiŝkaptaĵoj ĉiam okupos la lastan lokon inter ni.
— Kial? - demandas la noviko.
— Ĉar vi havas tre mallongajn brakojn.

**Valerij Nikolajeviĉ Habarov**
[GORJAĈIJ KLUĈ, Krasnodarskij kr., Rusio]

<u>malgrandaj dialogoj</u>

— Aĉetu jen tiun poŝtkarton, tre belan kun bona skribaĵo "Al mia solulino!".
— Donu dudek, bonvolu!

***

— Kie vi estis hieraŭ?
— Tio estas malvero! Kiu diris al vi!?

***


— Dormu kaj silentu!
— Mi dormos, sed silenti — neniam!

***

— Kiam via filino volas edziniĝi?
— Ĉiam!

***

— Kial vi kverelis?
— Li scias multajn maldecajn kanzonojn.
— Ĉu li kantis ilin al vi?
— Ne. Li fajfis la melodion.



# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 5 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Aleksej Bikov*
Studento. Ĵurnalismo, tre interesiĝas pri AFRIKO, precipe pri la Centra kaj la Suda partoj de la kontinento

p.k. 1820, OMKA-25, Omskaja obl., 644025,
RUSIO

*Ŝlikova Oksana*
lernantino 14 ja., "Mi korespondas kun 8 landoj kaj dez. ricevi novajn adresojn!"

Interklub "ESPERANTO"
Niĵnevartovsk-6
626440
RUSIO

*Anĝela Konopeŝko*
13-jara lernantino. Plezure legas gazeton KOMENCANTO kaj volonte korespondos kun iu el ĝiaj abonantoj tutmonde.

Interklub "ESPERANTO"
Niĵnevartovsk-6, 626440
RUSIO

s-ro *Hugo Mora Poltronieri*
korespondi pri nia lando

Apartado 4981
CR-1000
SAN JOSE
KOSTARIKO

s-ro *Yogolelo Lutombo*
kun katolikoj pri praktika katolikismo

B.P. 964,
BUKAVU,
KONGA Popola Respubliko

s-ro *Carlos L.Salazar Alvarado*
ŝako, skoltismo

Apartado 72, SAN ISIDRO DEL GENERAL
KOSTARIKO

s-ro Lee Jung Kee
Esperanto-instruisto volas havi korespondantojn por siaj gelernantoj

P.O.Box 4258,
SEOUL
KOREO

s-ro *Bashomba Kujirabwinja Joseph*
turismo, eblecoj de reciprokaj vizitoj

P.O.Box 541
MATADI,
KONGA Popola Respubliko

s-ro *Lee Kerr*
55j., turismo, ebleco de reciprokaj vizitoj

10545 Woodhavac Lene, BELLEVUE,
Washington 98004
USA

s-ro *Gil Guillory,*
ŝatas hundojn; eblecoj de reciprokaj vizitoj

79 Timsberspiro Lane,
The Woodlands,
HOUSTON, Texas,
77380-2894
USA

fraŭlino *Fumiko Kamaci*
korespondado pri skoltaj aferoj

205 Rumieru Kishi, 6-21-5, Kukuryo-cho,
Chochu TOKYO
JAPANIO

s-ino *Ikuko Hirota*
36ja., kor. tutmonde pri vojaĝoj kaj muziko

Sakuraguwa 2-1-64,
Takotu.
JP-764, KAGAWA
JAPANIO

KORESPONDI...listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonajon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.

R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

Nikolaj Starodubcev

## ILUSTRITA VORTARO pri HERALDIKO

1005 terminoj en sep lingvoj:
rusa, ukraina, angla, Esperanta, franca, germana, latina.
Doneck, 1996, 345 pĝ., enkonduka kaj reklampartoj ruslingvaj, kun indeksoj por ses lingvoj.
La kovrilo kolora firma kun plasta kovraĵo.
Formato 20x13 cm.
En la vortaro enestas tripaĝa reklamo pri Esperanto.
La prezo 75 ruslandaj rubloj por eksa USSR. Antaŭpagenda al:
Nikolaj Starodubcev, ul. N.Ostrovskogo 12-16,
340120 Doneck, Ukrainio.
*esperanto@postoffice.donbass.com*

INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO

Redaktas kaj eldonas : s-ro *R. J. Zverina.*
enhavas jare pli ol 1200 adresojn el pli ol 130 landoj de la mondo. Publikigo de via adreso kun teksto pri hobioj kaj temoj estas tute senpaga. Skribu viajn nomon, familinomon, kompletan adreson, interesojn, hobiojn, naskiĝjaron (laŭvole). Se vi deziras ricevi adresliston, bv sendi al ni 2 IRK.
PS: Ni serĉas landajn reprezentantojn en la tuta mondo!

5. kventa 26, CZ-460 01, LIBEREC, ĈEĤIO

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi. Ĉiu kiu deziras rekte ricevi adreson, aldonu du Internaciajn Respondkuponojn. Pliajn informojn petu ĉe la adreso:
**François Xavier Gilbert, B.P.6, FR-55000 Longe-ville-en-Barrois, Francio**

